



DEMOKRATIA KOMUNIKADO • PEDAGOGIA EFIKECO

# NIA PONTO

**Grupo Esperantista de Bilbao**
Barrencalle Barrena, 7-1ª deks.
48005-BILBAO (Hispanujo)
✍ *Redaktas:*
Jesús-Miguel García Iturrioz

**Kunven-tago:**
Vendredo (19:30-21:00 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
💻 esperantobi@gmail.com

(La E-Grupo de Bilbao estis fondita la 20an de majo de 1906)
TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj**: Normala: **60** €. ● Familia: **70** €. ● Juna (ĝis 30 jaroj): **20** €.
**KUTXABANK-konto** (IBAN-kodo): **ES44-2095-0023-5122-1800-1550**

**JULIO-SEPTEMBRO 2026** **Nro. 148 (3/26)**

## ASAMBLEA GENERAL ORDINARIA Y EXTRAORDINARIA

Por la presente, y según exigen sus estatutos, se convoca la asamblea general ordinaria del Grupo Esperantista de Bilbao para el próximo **viernes 25 de septiembre, a las 19,00 h.**, en su sede de Barrencalle Barrena, 7-1º dcha. (Bilbao), con el siguiente

**Orden del día**:
1. Lectura y aprobación, si procede, del acta de la asamblea general anterior.
2. Aprobación, si procede, del resumen de gastos e ingresos del año 2025.
3. Aprobación, si procede, del presupuesto para el año 2026.
4. Nombramiento de nueva Junta Directiva.
5. Ruegos y preguntas.

## ASAMBLEA GENERAL EXTRAORDINARIA.

Nada más terminar la asamblea general ordinaria, se constituirá la asamblea general extraordinaria, con un único punto en el **orden del día**:

1. Futuro de la sede del Grupo Esperantista de Bilbao y futuro del Grupo mismo.

**Dada la importancia que tiene hablar sobre el futuro de nuestra sede y de la viabilidad del propio Grupo Esperantista de Bilbao, esperamos que todos los socios acudan a la asamblea.**

**Aquéllos que no puedan acudir, siempre nos pueden transmitir sus opiniones a través de un correo electrónico o de whatsapp. Siempre, por escrito y hasta el 24 de septiembre.**

## ORDINARA KAJ EKSTERORDINARA ĜENERALAJ KUNVENOJ.

Tiel kiel vi povas hispane legi supre, la **vendredon 25-an de septembro, je la 19,00 h.**, oni okazigos la ĉiujaran ĉiesan kunvenon de la E-Grupo de Bilbao en ĝia sidejo de Barrencalle Barrena, 7-1ª dekstre laŭ la suba

**TAGORDO**:

1. Legado kaj aprobo, se indus, de la protokolo de la lasta kunveno.
2. Same pri la spezoj de la jaro 2025.
3. Same pri la buĝetpropono por la jaro 2026.
4. Nomumo de nova estraro.
5. Proponoj kaj sugestoj.

## EXTERORDINARA ĜENERALA KUNVENO

Tuj post fino de la ordinara kunveno, oni okazigos eksterordinaran ĝeneralan kunvenon kun unu sola punkto en la **tagordo**:

1. Estonteco de nia sidejo kaj de la Grupo Esperantista de Bilbao.

**Kiel vi povas konstati, en tiu ĝenerala kunveno oni pritraktos ege gravan aferon, nome, la pluan ekzistadon de la E-Grupo de Bilbao kaj la estontecon de ĝia nuna sidejo.**

**Pro tio, ni petas vian partoprenon.**

**Tamen, se vi ne povus persone ĉeesti la kunsidon, ĉiam eblas, ke vi sendu al ni viajn opiniojn, sugestojn, ktp. Vi devas tion fari skribe, pere de retpoŝto aŭ de vacapo. Kiel ajn vi faros, estu nepre skribe kaj ĝis la 24an de septembro.**

## Kunmemoro de la datreveno de la Eŭska Registaro.




Ĉi-jare oni kunmemoras oficiale la 90-an datrevenon de la unua eŭska registaro, formita dum la Hispana Enlanda Milito (1936-1939). Serio de biografioj publikigitaj de la reta gazeto eldiario.es mencias la ligon al Esperanto de du el la membroj de tiu registaro, Juan Gracia kaj Santiago Aznar.



Dum la pasinta Hispana Kongreso de Esperanto okazinta en Portugalete (Biskajo) okazis prelego pri ambaŭ samideanoj fare de nia amiko Toño del Barrio.

*(El "La Bitbulteno" de HEF. Num. 108. Sep. 2026)*

# LOKE

## 84a Hispana Kongreso en Portugalete

## 125 aliĝintoj.

Finfine, 125 homoj aliĝis al la Hispana Kongreso, okazinta en Portugalete de la 14a ĝis la 18a de julio. Alvenis homoj el 12 landoj.

Ĉi sube vi trovos raporton pri la kongreso, kiun ĝentile sendis al ni Maria Merla, kongresanino el Germanio.

## RAPORTO PRI LA KONGRESO.

En Eŭskio okazis la hispana kongreso de Esperanto (14/18.07.2026) (raportas Maria Merla)

Ĉu por fuĝi de la varmega vetero en Germanio oni vojaĝu suden??
Jes! La hispana kongreso de Esperanto okazinta en eŭska Portugalete ĉe la 'ría de Bilbao' estis okazo por ĉ.120 partoprenantoj el 12 landoj ĝui konstantan venteton de la maro kaj temperaturojn de nur 26 - 28°C dum kvin tagoj.

La kongresejo troviĝis en la UNED (universitato pri ne-ĉeesta edukado) en belega malnova konstruaĵo ene de granda ombra parko. La kunveno, kiun organizis la Esperanta Grupo de Bilbao, kiu ĉi jare festas sian 120-jaran ekziston, invitis al interesegaj, instruaj prelegoj (i.a. pri artefarita intelekto, bildstrioj en Esperanto, Blisa skribo, la eŭska lingvo kaj historio, la pensulo kaj origamiisto Miguel de Unamuno kaj pri magio, ktp)

Promenadoj en la apudaj urbetoj Getxo kaj Sestao sciigis nin pri la regiono kaj ĝia historio dank'al kompetentaj ĉiĉeronoj.

Kun la minista pasinteco de Eŭskio ni konatiĝis dum ekskursoj: ni vizitis ministan vilaĝon kaj ministan muzeon, kiu montris la pasintjarcentajn aĉajn laborkondiĉojn de la minista laboristaro, inter ili ankaŭ virinoj kaj infanoj. En iama forĝejo oni eĉ por ni forĝis ilojn - ege impresa spektaklo estis tio.

Survoje ni ankaŭ vizitis Gallarta-n, naskiĝvilaĝo de Dolores Ibárruri, fama batalantino kontraŭ Franco. Ŝin oni kromnomis 'Pasionaria'.

Aparte agrabla travivaĵo estis ŝipveturado de Portugalete al Bilbao sur 'Ría de Bilbao'. Preterpasis ni la imponan muzeon Guggenheim konstruita de Frank Gehry kaj poste kablotramo portis nin al la monto Artxanda (251m), de kie ni ĝuis panaramon de Bilbao. La vespermanĝo komuna okazis en la klubejo de la Esperanto-grupo en Bilbao, en la malnova kvartalo de la urbo. La grupanoj estis tie preparintaj por ni bongustegajn manĝaĵon kaj bonan vinon, kiujn ni frandis vigle babilante kaj auskultante spontanan muzikumadon de kelkaj samideanoj.

Alia kulmina programero okazis vesperon en gotika preĝejeto en Portugalete. Ni havis okazon aŭskulti eŭskan muzikon ludita de 'Telemann Trío' (orgeno, ĉaskorno, soprano). La kantistino estis Susana Zabaco, profesia sopranistino el Bilbao kaj membro de la LKK. Ŝia voĉo absolute min fascinis. Fine de la koncerto ili/ni kune kantis/ludis 'La Espero'-n.

La tagon post la oficiala fermo de la kongreso eblis partopreni en komuna bankedo posttagmeze.

Kompreneble mi ne maltrafis tiun okazon. Dum pli ol tri horoj oni al ni servis bonegajn eŭskajn kaj hispanajn pladojn, ekzemple fiŝaĵon au asparagojn, cxiam akompanataj de rugxa vino el la Rioja-regiono. Kia regalo!

Kaj tre bonfartige estis dume ĝui la viglan, agrablan babiladon kun malnovaj kaj novaj geamikoj!

Dum tiuj tagoj en Eŭskio mi la unuan fojon aŭdis la eŭskan lingvon kaj vidis ĉie sur ŝildoj, informtabuloj kaj reklamafiŝoj tiun fascinan, plej malnovan lingvon de Eŭropo, kies originoj ĝis hodiaŭ restas nekonataj.

Malkiel multaj pensas, la eŭska ne estas aparte malfacila. Ĝi estas tute fonetika kaj rilate al vortfarado, verbsistemo ktp absolute logika!

Kaj malkiel en multaj aliaj landoj, en Eŭskio la homoj surstrate au entrame, kun kiuj mi ofte ekbabilis kaj kiuj ege ĝentilis kaj helpemis, ĉiam sciis pri Esperanto.

Venontjare la hispana Esperanto-kongreso okazos en Ekstremaduro. Nepre mi aligxos!!!

Maria Merla (el Germanio)

P.S: Dankon, Maria, pro via raporto. Ĉiam estas interesa vidpunkto de homo, kiu ne apartenis al la LKK kaj eĉ venis el alia lando.

## **Kongresanoj**.




Parto de la kongresanoj antaŭ nia sidejo.



Ĉe la monto Serantes




Intervjuo en radio




Antaŭ la kongresejo

**HEF**




Laŭ oni aprobis en la kongreso de Portugalete, la venonta hispana kongreso okazos en bela urbo de la tiel nomata "Ekstremadura Siberio", kie oni ankaŭ kongresis en la jaro 2016: Herrera del Duque (Badajoz).

## NOVAJ KURSOJ EN UNED.

Denove ĉijare estos instruata kurso de Esperanto en la Nacia Universitato por Neĉeesta Edukado (Universidad Nacional de Educación a Distancia, UNED), en tri niveloj: A2(komencantoj), B1 kaj B2 (tiu ĉi nivelo B2 estis proponita unuafoje pasintjare kaj nun denove estas elektebla). La enskribiĝo eblos ekde la 8-a de septembro, ĝis la 21-a de oktobro. La kurso mem komenciĝos en novembro.

La kursoj B1 kaj B2 estas instruataj en Esperanto mem, do ni rekomendas ke vi sciigu pri ĝi al viaj amikoj ekster Hispanio, ĉar ankaŭ ili povas enskribiĝi, kaj tiu estas unu el la tre maloftaj kazoj en kiuj oni ricevas universitatan diplomon pro la studado de Esperanto.

Ni ankaŭ povas anonci ke MEL proponos stipendiojn por homoj loĝantaj en la Madrida Komunumo. Kondiĉoj estos baldaŭ diskonigataj.
Vidu ĉiujn informojn ĉe: https://www.uned.es/universidad/inicio/estudios/idiomas.html.

*(Nia Voĉo. Organo de madrida esperanto-liceo. Septembro 2026)*

## Pliaj stipendioj por la UNED-kursoj.

Jen anonco, kiun aperigis niaj amikoj el valencio ĉe
**https://valencia.esperanto.es/eo/2026/08/13/**




**Ĉu vi loĝas en la Valencia Komunumo kaj volas lerni aŭ plibonigi vian Esperanton?** La Esperanto-Grupo de Valencio anoncas **stipendiojn por la Esperanto-kurso ĉe UNED dum la akademia jaro 2026/2027**.

La stipendioj estas destinitaj al **homoj loĝantaj en la Valencia Komunumo** kaj kovras **100 % de la aliĝo kaj ankaŭ la kotizon de HEF**, kondiĉe ke oni sukcesu en la fina ekzameno.

La kurso okazas **malproksime**, do vi povas studi de hejme. Krome, **ne necesas esti komencanto**: eblas studi je la niveloj **A2, B1 kaj B2**, laŭ la nivelo de ĉiu studento.

La aliĝperiodo ĉe UNED daŭras de la **8-a de sept. ĝis la 21-a de okt. 2026**.

**Antaŭ ol aliĝi al la kurso, aliĝu al HEF.** Hispana Esperanto-Federacio havas interkonsenton kun UNED, kaj ĝia membro pagas **170 € anstataŭ 254 €** por la sama kurso. La jara kotizo de HEF estas **30 €** por individua membro, do eĉ paginte ĝin vi gajnas. La rabato aplikiĝas **en la momento mem de la aliĝo**: poste ne plu. Kaj ankaŭ la kotizon vi ne pagas: **la stipendio kovras la aliĝon kaj la kotizon de HEF**.

**HEF**

## NE FINIĜAS LA KONGRESOJ DE ESPERANTO.

Ĉi-somere okazis multaj naciaj kaj internaciaj esperantaj kunvenoj, inkluzive de kelkaj tre gravaj en Hispanio. Sed la ŝancoj partopreni en amika renkontiĝo, kun interesaj agadoj en Esperanto, ne finiĝis. Kaj ni volas aparte reliefigi la du kunvenojn okazontajn dum la venonta oktobra longa semajnfino.




En **Malago, la 22-a Andaluzia Esperanta Kongreso** okazos inter la 9-a kaj 12-a de oktobro, lige kun la kunveno "Esperanta Naturamikaro" (Amikoj de la Naturo).

Ankaŭ dum la oktobra longa semajnfino, la **41-a Kataluna Esperanta Kongreso** okazos en la urbo **Reus**. https://Kongreso.esperanto.cat/eo/

Kaj memoru ke oni povas trovi multajn aliajn renkontojn, el la plej internacia ĝis la lokaj kaj eĉ multaj retaj, pere de la retejo **EventaServo.org**.

*(El "La Bitbulteno" de HEF. Num. 108. Sep. 2026)*

## PREMIO DE POEZIO ĈE LA VENONTA HISPANA E-KONGRESO.




Komence de oktobro de la venonta jaro 2027 en la urbo Herrera del Duque, en la provinco Badajoz, regiono Ekstremaduro, okazos la 85ª Hispana Kongreso de Esperanto.

Kulminaĵo de la kongreso estos la Internacia Konkurso de Esperanta Poezio "Miguel Fernández", sponsorita de la urba konsilantaro, kaj jam oficiale kunvokita. Vi povas legi la regulojn, en Esperanto, ĉe la HEF-retejo.

Partoprenu: ĝi estas unika ŝanco montri Esperantan poezion al publiko ekster nia komunumo.

*(El "La Bitbulteno" de HEF. Num. 108. Sep. 2026)*

## Provizora programo de la 85a Hispana Kongreso.

Jam estas preta la unua provizora programo por la kongreso de la jaro 2027 en Herrera del Duque.

## TRA LA MONDO ...

## La 113-a UK okazos en 2028 en Kaŭno, Litovio!

La Estraro de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kun ĝojo anoncas, ke la 113-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) okazos en Kaŭno (Kaunas), Litovio, en 2028.

Post Melburno/Narrm en 2027 la UK revenos al Eŭropo kaj same revenos al Litovio kaj al Baltio post la 90-a UK en Vilno en 2005.

Okazonte la unuan fojon en Kaŭno, la 113-a UK gastiĝos en la dua plej granda urbo de Litovio kaj unu el la plej gravaj kulturaj centroj de Baltio.

La elekto pri Kaŭno aldone havas historian kaj simbolan signifon por la movado: la urbo ankaŭ estas forte ligita al la historio de Esperanto. En Kaŭno naskiĝis Klara Zilbernik, la edzino de L. L. Zamenhof kaj unu el la plej gravaj subtenantoj de la frua Esperanto-movado, sen kies malavara gesto kaj amo ne estus publikigita la Unua Libro.

*(Gazetaraj Komunikoj de UEA. N-ro 1301. 25-05-2026)*

## Ĉu esperantista prezidento por Hungario?

La denaska esperantisto kaj mondfama ŝakisto Judit Polgár iĝu la sekva prezidento de Hungario. Tion proponas dek ses elstaraj hungaraj figuroj de scienco, kulturo kaj sporto en letero al la prezidanto de la parlamento.



La novan prezidanton de Hungario nun devos elekti la parlamento, kaj ĵus aperis neatendita propono: la postenon havu Judit Polgár, mondfama ŝakisto kaj denaska esperantisto.
Ŝin proponis dek ses elstaraj reprezentantoj de scienco, kulturo kaj sporto en letero al la prezidanto de la parlamento.

(Libera Folio je 2026-07-20)

Noto: Kelkajn tagojn poste Judit Polgár rezignis pri la propono pro la nuna politika situacio en Hungario.

## En la retejo de la ŝtatprezidento de Pollando - aranĝoj de esperantistoj.

Okazis legado-aranĝoj de esperantistoj (realigitaj la 5-an de sept. 2026, kadre de la legado de tre interesa kaj speciala verko de A. Mickiewicz, en Pollando kaj en multaj aliaj landoj). Ili estas registritaj en la oficiala retejo de la Prezidento de la Pola Respubliko. La paĝoj estas videblaj por ĉiuj kaj vizitataj de milionoj da homoj en la mondo, i.a. de multnombraj ĵurnalistoj, bibliotekistoj, instruistoj, fakuloj pri literaturo, sociologoj, studentoj.

**SIGNIFO** por Esperanto kaj esperantistoj
Tio estas bona maniero videbligi Esperanton. Kaj por esperantistoj - eblo studi pri altvalora alilanda verko (ĉiujare alia).

*(Maria Majerczak-Ricevita per retpoŝto. 13/09/2026)*